




4* 1991*145

STARTO

ORGANO DE ĈEHA ESPERANTO-ASOCIO



Poruŝuje ĈES princip neutrality?

Mnozi z Vas dostavate materialy Radikalní strany (RS) a nekterí se protáte, zda ĈES nevestoupil na pole politiky, ĉi zda si již dokonce nevybral svou stranu? Odpovídáme jednoznačně, že vobec ne!

Ti, kterí se zoĉastnili 6. sjezdu ĈES v Třebíĉi si pravdě-podobně vzpomenou na projev zástupce RS a jeho kladný poměr k esperantu. Pochopitelně však ani toto nebylo impulsem pro vedení ĈES ke vstupu do politické arény.

Na jaře 1991 jme prožívali velice těžké období, kdy hrozilo, že nebudeme schopni personálně ani finančně zabezpečit ani expedici Starta. Kromě plánované rekonstrukce sekretariátu nás zastihla i onemocnění a navíc jme se museli snažit zlepšit naši finanční situaci. I proto jme dodatečně pristoupili k pořádání predkongresu IFEF v Praze, což pohltilo zbytky našich sil a času. V tomto období jme proto dohodli spolupráci s RS, ktera se zavázala bezplatně prevést dle našich požadavků celou kartotéku ĈES a pomoci s expedici Starta. Na oplátku jme umožnili RS obeslat se svymi materiálly mnohé naše členy, což RS praktikuje i u jiných organizací. RS slíbila, že nezneužije poskytnutých adres a že se nebude dovolávat podpory ĈES, což beze zbytku plní. Navíc nám zdarma a rychle pomáhá i pri expedici dalších čísel Starta a jiných materiálů.

Jak je zřejmé, záleží plně na Vašem osobním svobodném rozhodnutí, jak s došlými materiálly naložíte. Nikdo, kdo se sám nerozhodl, se samozřejmě nestal členem RS, ani není vázán k nějaké finanční úhradě. RS Vás

obeslá jako svobodné jedince, které chce seznámit se svým programem a činností. Můžete odepsat, materiály odložit, vyhodit, ĉi požádat, aby Vám nebyly dále zasílány. ĈES sám hodlá nadále zostat stranou politiky a neupřednostňovat jaký-koliv směr. Naši chybou bylo, že jme Vás neinformovali o vzniklé situaci dříve. Věřím, že uveděné delší vysvětlení alespoň částečně naši chybu naprávuje.

Za radu ĈES:

Vladimír Dvořák, místopředseda

Rimarko de la redakcio:

(Ĉu la ĈEA rompas la principon de neŭtraleco?)

La transnacia Radikala Partio (RP), kies sidejo estas en Italio, proponis printempe al ĈEA helpon kun komputila prilaborado de la ĈEA-adresaro kaj kun ekspedado de la gazeto Starto. Poste ĝi sendis al multaj esperantistoj ankaŭ siajn materialojn, interalie promeson proponi al 40.000 deputitoj de eŭropaj parlamentoj akcepti Esperanton kiel komunan lingvon de la estonta unuigita Eŭropo. Petante subtenon de la intenco, RP almetis ankaŭ sian anigilon, kio vekis impreson ĉe la ĈEA-anoj, ke ĈEA rompis sian neŭtralecon, enmiksiĝis en la politikon kaj eĉ elektis sian partion. Tial la vicprezidanto de ĈEA Vladimír Dvořák klarigas al la membraro la situacion, konfirmas la daŭrantan neŭtralecon de ĈEA kaj certigas, ke RP sendas nur informojn, kiujn oni rajtas neglekti.

*** Esperanto ektuŝas la kosmon ***

Unue pia fikcio en tiu ĉi kursivaĵo, due la realaĵo. Esperanto estas parolata ne nur sur la mondo sed laŭaserte, ekstermonde, posttombeĵe!

La ĉefa Esperanto-poeto Stanislav Schulhof (1864 - 1919) diktis la 12-an de decembro 1943, laŭdire, al brazila mediumo jenajn versojn, ni trovas ilin en la libro "Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo", eld. en 1944 en Rio de Janeiro, 114 paĝoj, sur p. 71-72:

Ankaŭ mi volas kunlabori
Dum longa tempo mense enmergite
en ondojn de memoro, tre diversajn,
je iu tago aŭdis mi subite
parolojn klarajn kaj eĉ frazojn versajn
en lingvo, kiun ĉatis mi surtere:
En Esperanto, la ligil' benita
de la nacioj, kiujn fat' mistere
disigis per malam-ide' milita.
Ekgojis mi, aŭdinte en ĉi sfero
paroli tiun lingvon de l'homaro ... (ktp.)

Kaj sur la p. 114 la leganto surpriziĝas pro jena saluto de la antaŭ longe mortinta ĉehdevena brazilano, poeto, al la brazila mediumo, laŭdire senklara vilaĝano, Francisko Kandido Xavier (savier): "Kune kun aliaj spiritoj - samideanoj salutas vin Teodoro A. Doležĉ." - Kaj eĉ Zamenhof donas tie (p. 63 k.a.) mesaĝon "Al la esperantistaro" ... (j. 1943).

Sed jam urĝas forlasi tiun ĉi ja ĉarman, tamen senbazan privatan fikcion kaj reveni en la mondon de realo. Sole tiu konvinkas nin. Ĉu vi eble ne kredas, nun, post la ekkonduko, ke Esperanto reale, efektive ŝvebas en la kosmo? Ĉesu dubi! La reale ekzistanta planedo Euperanto kuraĝe kaj elegante trakuras sian orbiton inter la grandaj planedoj Marso kaj Jupitero. Ĝi ja eĉ posedas sian numeron en astronomia katalogo: Planedo n-ro 1421. Ĝin fidele akompanas la alia el la multaj asteroidoj, la Planedo n-ro 1462: Zamenhof. Ilin malkovris la sukcesa enkosma serĉanto, finna astronomo d-ro Yrjö Väisälä. Tiu ankaŭ fariĝis ilia baptopatro. "Do la nomo de nia Majstro kaj de nia lingvo jam atingis la ĉielon" - ridete raportis siatempe gazetoj.^{1/}

Liberan vojon por Esperanto preparis, la verdulman trafiksignalon lumigis la "patro de la kosmonautiko", sciencisto Konstantin Ciolkovskij (1857 - 1935): "Komprenble Esperanto estas la plej bona el ĉiuj artaj lingvoj. Senduba simpleco de la alfabeto, admirinda facileco de la gramatiko, riĉeco de la vortfarado, faras ĝian kreinton sanmorta." (El letero de M.I. Porov, 1934-11-04, en "Ciolkovskij" de M. Arlazorov, eld. Molodija Gvardia, 1962, p.225).^{2/}

La laŭvice duan kosmonaŭton de la mondo, German Stepanoviĉ Titov, edukis rusa instruisto kaj entuziasma esperantisto Stepan Pavloviĉ Titov. Stepan eĉ gvidis en j. 1964 la sovetan delegacion al la 49a Universala Kongreso de Esperanto en Hago.

La sovetia libro "700.000 kilometrojn en la kosmo", eldonita tuj la sekvan tagon post la alterigo de la spacoŝipo Vostok 2,

informas (p. 165): "La instruisto Stepan Pavloviĉ Titov, la patro de la kosmonaŭto G.S. Titov, en sia junaĝo estis paŝie interesata de Esperanto; li regis tiun lingvon, en Esperanto-gazetoj publikigis versojn, glorantajn precipe la naskan Altaĵon, vaste korespondis kun preskaŭ ĉiuj mondpartoj ..." Kaj en 1980 kajoroj de Budapeŝta Informilo, ankaŭ la gazeto Esperanto (UEA) kaj krome aparta aŭdiŝo de HEA alportis atentokaptan informon, ke la unua hungara kosmonaŭto, Bertalan Farkas, flugis en la kosmon "armita" krom per multaj aliaj necesajĵoj ankaŭ per bona scio de la lingvo Esperanto: antaŭ kelkaj jaroj li faris ekzamenon pri scio de tiu lingvo kun sukceso tre bona.

Kosma sondo Voyager portas oran diskon kun sonoj de la Tero; inter ili estas teksto en Esperanto. Enparolis ĝin la aŭstralia ambasadoro ĉe UNO Ralph Harry (Bulteno de Esperantista Klubo Brno, n-ro 6, 1986).

Trudiĝas la demando: kio sekvas plu?

Jaroslav Mařík

^{1/} Heroldo de Esp., el 1950-03-01; "Esperantista", Praha, 3/1950;

^{2/} Isaj Dratwer: "Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj", 2-a eld., 1977, Tel-Avivo, p. 120, au la 1-a eld., 1970, p. 77.

»» Planlingvo kaj scienca fikcio ««

La bezono pri interhoma komunikaĵo, kun la pli rapide evoluanta tekniko taksas al la homoj fronti la problemojn de planlingvo internacia kaj eĉ kosma. Ni resumu kelkajn donitaĵojn pri la problemoj, kiel ĝin rigardas verkistoj kaj teknikistoj.

JULES VERNE (1828 - 1905), la fama aŭtoro de scienc-fikciaj romanoj, parolas en sia romano **Dudek mil mejlojn sub la maro** pri tute speciala lingvo de la ŝiranoj de Nautilus el diversaj rasoj, konata nur al ili mem. Plurajn jarojn poste li esprimis sian entuziasmon pri la internacia lingvo kaj antaŭvidis brilan estontecon kaj al Esperanto kaj al la esperantista ideo. Li projektis verki romanon, kie Esperanto ludus gravan rolon. Li ofte ripetis, kiel informas lia nevino Allotte de la Fuye en lia biografio, ke la ĝlosilo de komuna lingvo, perdiginta en la Babelturo, povas esti refarita nur per la uzado

de Esperanto. Sed li, bedaŭrinde, ne gievivis realigon de tiu plano.

Influe de sia amiko Charles Tassencourt en Amiens, fondinto de Esperanto-grupo, Jules Verne ne nur lernis Esperanton, sed konsentis eĉ fariĝi honora prezidanto de tiu grupo. Li planis partopreni la I-an Universalan Kongreson de Esperanto en 1905, sed pli frue, en la sama jaro trafis lin morto.

La filo de Verne finskribis la planitan romanon de sia patro, sed la aferon de Esperanto li tie ellasis. Tamen valoras eĉ nur la intenco de la verkisto. Pri kosmaj flugoj revis kaj skribis la rusa esperantisto **Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857 - 1935)**, matematikisto kaj inventisto, pioniro de astronautiko. En letero al M. I. Popov (1934) li konstata, ke Esperanto kompreneble estas la plej bona el ĉiuj artaj lingvoj kaj ĝiaj kvalitoj

faras ĝian kreinton senmorta.

LINGUA COSMICA

En kunsido de la Rega Akademio de Sciencoj en Amsterdam prof. Freudental deklaris, ke li posedas parte prilaboritan vortaron de kosma lingvo - Linco. Per tiu lingvo, kunmetita surbaze de matematikaj, geometriaj kaj algebraj helpiloj, laŭdire eblos interkomprenigi pere de varie modulitaj ondoj kun la loĝantoj de Marso kaj Venuso.

"La kosmo serĉas komunan lingvon" - sub tiu titolo rusa R. Dobruŝin raportas pri **Lingua cosmica - LINKOS**, de la sama Freudental (do kun ŝanĝeto en la nomoj). Linkos estas sole abstrakta skemo de lingvo, ne ĝia konkreta esprimiĝo. Same kiel literoj diferenciĝas de lingvo-sono, ankaŭ Linkos diferenciĝas disde konkreta formo, ĉu de radio-signaloj, ĉu de lum-signaloj. Do, la unuaj "literoj" de la kosma lingvo estos elsendataj per son-signaloj. Ili estos siaspecaj "kosmaj interjekcioj". - Tiel respondas la d-ro de fizik-matematikaj sciencoj R. Dobruŝin al "unu el la aktualaj problemoj de proksimiĝantaj interplanedaj flugoj: kiel niaj astronautoj interkompreniĝos kun aliplanedanoj."

Ĉu entute eblas rezoni pri komuna kosma lingvo? La usona profesoro Coleman opinias tiujn rezonadojn fantaziaj. Li diras: La spirita mondo de tiuj estaĵoj tiom diferenciĝos de la nia, ke ni ne povos interkompreniĝi eĉ per la plej bonaj "pensantaj maŝinoj".

Kiel ni donos signalon al aliplanedanoj, ke sur la Tero vivas raciaj estaĵoj, pripensadis jam antaŭ jardekoj **Ciolkovskij**. Li firme kredis, ke ne estas malproksima la tempo, kiam la Teranoj serĉos kontakton kun siaj "ĉielaj najbaroj" - Je

tiu demando provis respondi Dobruŝin, kiel supre.

Usona verkisto H. Harrison en sia romano "Deathworld" (Mortmondo), kies temo estas scienca fikcio rilate al interplanedaj vojaĝoj, kelkfoje parolas pri Esperanto kaj esperantlingvaj vortoj estas uzataj por indiki la nomojn de bestoj, objektoj ktp. Doktoro de fizik-matematikaj sciencoj S. E. Ĥajkin en Moskvo skribis pri la ebleco de senpera ekkontakto kun supercivilizacio, kies evolu-nivelon la Teranoj atingos post dekmiloj, ja eĉ post centmiloj da jaroj (!).

Tie havos grandan taskon la problemaro de radio-astronomio. Estas ankaŭ ebleco, ke iu ege evoluinta ekstertera civilizacio atendas, ĝis kiam la Tero ekhavas rimedojn por interkontakti? Ni tamen devos atendi ankoraŭ jarcentojn por eventuale kontakti kun civilizacio en la proksima parto de la galaksio. Tia perspektivo povas negative influi sciencistojn.

En Heroldo de Esperanto ni povis legi antaŭ jaroj, ke la ĉeĥa sciencisto profesoro R. Ješek avertis antaŭ serĉado de kosmaj kontaktoj, ĉar nin povus trakti malamike ekstertera civilizacio.

Esperanto trovas aplikon en la (grandkajeraĵ, 27x20 cm) scienc-fikciaj romanoj de ĉeĥa aŭtorino **Ludmila Freiová**: la volumon 153 de romanserio, titolitan "Timo sur la planedo Kvara" (Strach na planetě Kvara), sekvis daŭriga volumo n-ro 194 "Fremduloj sur la planedo Kvara" (Cizinci na planetě Kvara). Sur tiu planedo du lingvoj estas parolataj, la dua estas Esperanto kiel internacia lingvo de kleruloj. Ĝi estas proponata ankaŭ al vizitantoj el la planedo Eas. Laŭ informo

de s-ano Herman verkis Freiova la trian parton, "Linio Tero - Kvara" (Linka Země - Kvara), ankoraŭ ne publikitan. Tie Esperanto jam estas tutplaneda lingvo.

Intereson de psikiatroj en la tuta mondo elvokis fine de la 50-aj jaroj la eksterordinaraj kapabloj lingvokrea de paciento Vladimir X., en la psikiatriejo en Bohnice (Prago). Tiu ĉi milda, profesore kondutanta dumviva paciento kreis, alidire reproduktis, 10 kompletajn lingvojn de nacioj sur kelkaj asteroidoj kaj planedoj, ekz. Thesis kaj Astron. Laŭ aserto de lingvo-fakuloj, liaj lingvo-projektoj estis logikaj kaj uzeblaj. Raketo el Astron pro paneo sur-Terigis, kaj Vladimir X. kontaktis la Astronanojn. Krom tiuj 10 aliplanedaj

lingvoj s-ro X. (la plena nomo ne konata) perfekte kaj admiringe facile regis 23 lingvojn de la Tero, inkl. japanan, kiel konfirmis lia kuracisto kaj patrono d-ro Jaroslav Stuchlík; normala homo kun meznivela inteligento kapablas regi perfekte vorte kaj skribe maksimume tri lingvojn.

V.X. asertis esti en daŭra kontakto kun aliaj planedoj, kies lingvojn li plene regas. Laŭ d-ro Stuchlík, la fenomeno V.X. ne havas analogion en paseo nek nuntempo.

Rilate la scienc-fikciajn verkojn mi fine povas menciiti: CEA estas eldoninta Esperantan tradukon de "La perdita vizaĝo" (de J. Nesvadba), MEP Olomouc eldonis en 1933 "Mi en li" (de L. Vladyka).

Jaroslav Mařík

Fontoj:

- Isaj Dratwer: Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj, 2-a eldono, Tel Aviv, 1977;
- Dr. J. Mana: Technicky tydeník, Praha, 51-52/1969;
- R. Dobrusin: Svet socialismu, Bratislava, 41, 1962;
- Pekelis-Hajkin: Technické noviny, Bratislava, 5, 1969;
- pri Vladimir X. vidu detalojn en la gazetoj:
 - Tagiĝo, Ostrava, 38, 1958, p.10-11;
 - Vešmír, Praha 1, 1958 (kun ilustraĵoj pri la planedaj lingvoj);
 - Odpovědi na otázky, Bratislava, 5, 1959, p. 12;
 - arkivo de la aŭtoro.

Korektoj:

En STARTO 1/91, p. 11, 10-a linio de malsupre: ĉe s-ino Bárbochová, honora membrino, ni erare menciis Sokolovská-strato.

En STARTO 2/91, p. 12, ni forgesis indiki, ke la bibliografiojn de F. Pytloun kaj M. Lukáš verkis Jaroslav Mařík, kiu deziras aldoni ĵenan citaĵon de M. Lukáš: "Mi studis multajn naciajn lingvojn, sed en la praktiko - vojaĝado - plej multe helpis min Esperanto - ĝi estas ligilo preskaŭ mirakla ... en vico da landoj gastigis min nekonataj homoj ..."

ĈU VI KONAS LA REVUON FONTO ?

La literatura revuo Fonto aperas en Brazilo kaj alportas literaturajn francaĵojn el la tuta mondo. Se vi verkas aŭ tradukas, vi povas sendi viajn beletraĵojn aŭ esejojn, ankaŭ anekdotoj estas akceptataj. Jam aperis 10 jarkolektoj po 12 numeroj kaj ĉiuj estas ankoraŭ mendeblaj. La jarabono estas 30 guldenoj, sed oni skribas: "Nepagipovaj landoj por Fonto ne ekzistas! Ĉiu povas facile aranĝi la aferon; skribu rekte al la eldonanto (kiu ĉiam trovos solvon): Fonto (Gersi Alfredo Bays), Caixa Postal 49, BR-89800 CHAPEKO-SC, BRAZILIO. Sed ne proponu tion al niaj perantoj!"

PASPORTA SERVO

TEJO informas, ke la ĉijara eldono de Pasporta Servo jam aperis.

Prezo: 15 nederlandaj guldenoj, mendoj ekde tri ekzempleroj ricevas trionan rabaton. Mendo ĉe UEA/TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

FAME-FONDAĴO

koncesiita de la registara prezidie en Stuttgart kunlabore kun la sudgermana urbo Aalen preparis Esp.-kulturpremio en la valoro de 10.000 germanaj markoj, el kiu estos premiataj "personoj, asocioj aŭ organizoj, kies kreado, utilo aŭ disvastigado de kulturaj verkoj kadre de plurjara engaĝo laŭ la celoj de publika utilo de FAME-fondaĵo utilis al la subteno de internaciaj kompreniloj". La prezidanto de la fondaĵo estas Alois Meiners, Im Asemwald 62/9, W-7000 Stuttgart 70, Germanio.

ESPERANTO EN AFRIKO

La sudafrika "Esperanto-Klubo Surmonteta" ĉe la Universitato de Kaburbo estas tute nediskriminianta klubo, kiu eldonas propran gazeton por antaŭenpuŝi la E-movadon en Afriko kaj por trarompi la izolitecon de la lando. Ili akceptas kontribuojn por la gazeto (prefere tajpitajn sur A4, ilustraĵoj, fotoj kaj monhelpo bonvenaj). Skribu al la adreso:

Esperanto-Klubo Surmonteta, Green lavel, Students Union, University of Cape Town, Private Bag, 7700 RONDEBOSCH, Republic of South Afrika.

Gratulon pro la resaniĝo de Pasporta Servo!



Post unu jaro aŭ pli, jen denove!
Mendo ĉe UEA/TEJO
Jus aperis la eldono 1991

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA KAJ GASTEJO EDMOND PRIVAT

en la svisa La Chaux-de-Fonds anoncas, ke post la somera reorganizo komenciĝos la nova programo en novembro 1991. Tamen senrompe vi povas aĉeti librojn ĉe la libroservo (preskaŭ du mil titoloj) kaj ankaŭ brokantaĵojn (katalogo sendebila kontraŭ 6 internaciaj respond-kuponoj). Daŭre funkcias ankaŭ korespondaj kursoj por francaj germanlingvanoj. Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, postfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

PARIZA ESPERANTO-FESTIVALO

Internacia Esperanto-festivalo en Parizo okazos jam la 7-an fojon en la tagoj 9-10-11 novembro 1991. En la programo allogas "La pupodomo" de Ibsen, "Kia koincido" (Germanio), recitalo de Ĵak Le Puil (Francio), muziko per malnovaj tradiciaj instrumentoj, koncerto de rokmuziko, forumo "Kien la poezio?", ekspozicio de esperantistaj artistoj, ekz. kungluaĵoj de Germaine Hoffmann (Luksemburgio), lunde gvidata vizito de Parizo "Historio de Esperanto en Parizo" kaj aliaj programoj. Eblas rezervigi hotelĉambron je modesta prezo. Skribu al: D. Doye, 169 avenue de Choisy, F-75013 Paris, ad C. Nourmont, 2 om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgio.

FESTIVALO POR MEZAĜULOJ


Internacia Festivalo en germana Sensenstein (20 km oriente de Kassel) realigas jam la 8-an fojon inter la 27-a decembro 1991 kaj la 3-a januaro 1992. La festivalo prezentas programon por mezaĝuloj (25 - 55-jaraj personoj) kaj por junaj familioj, kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estos bonvenaj. Pri la temo "La Eŭropa familio - en komparo" okazos prelegoj kaj diskutrondoj. Por komencantoj (ekz. via partnero) oni preparas kursojn, por infanoj specialan programon. Tradicia silvestra balo kaj aliaj vesperprogramoj. Ĉambroj 2 - 6-litaj, naĝejo, saŭno, gimnastikejo. Kotizoj 360 DM, studentoj 250 DM, infanoj 150 DM. Skribu al: Hans-Dieter Platz, postf. 1148, W-3501 Niedenstein, telefona numero D - 05624/8007.

TAIZÉ-RENKONTIĜO EN BUDAPESTO

Taizé estas ekumena frataro, kiu gastigas homojn el la tuta mondo, ĉefe gejunulojn, somere hejme en Francio, dum la tuta novjara semajno en iu Eŭropa lando. Kutime venas kelkaj dekmiloj da homoj, okazas meditecaj diservoj, diskutrondoj pri bibliaj temoj ktp. Dum la venonta jaraŝanĝo 1991 - 1992 okazos la Taizé-renkontiĝo en Budapeŝto, preparata estas ankaŭ partopreno de esperantistoj. Interesitoj skribu al: Reinhard Pilüger, Jakob-Trumpfheller-Str. 6, W-6800 Mannheim, Germanio, telefona numero D - 0621/35624.

LA 1-AN MONDKONGRESO DE ESPERANTISTOJ HANDIKAPULOJ

Asocio de Esperantistoj Handikapuloj (AEH) aranĝos de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1992 la 1-an Mondkongreson de Esperantistoj Handikapuloj en fama banurbo Františkovy Lázně, Ĉeĥoslovakio, kie estis konstruita en la jaro 1914 la unua en la mondo monumento de D-ro L. L. Zamenhof. Informojn petu kaj provizorajn aliĝojn sendu al Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, p.k. 63, CS-274 01 Slaný ĝis la limdato - 31.12.1991



Kunlaboro inter AIS San Marino kaj Karola Universitato Praha

La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj la Karola Universitato Praha subskribis la 24-an de majo 1991 en Prago kontrakton pri kunlaboro. La pedagogia fakultato de KU Praha disponigos konvenan lokon por AIS-filio, kies laborlingvoj estos ILO (Internacia lingvo de doktoro Esperanto), la germana kaj la ĉeĥa. En aliaj universitatoj kaj altlernejoj de la Ĉeĥa Respubliko povas fondiĝi informoj de la ĉeĥa AIS-filio. La aktivado de la ĉeĥa filio inkluzivos internacian kunlaboron en klerigaj kaj esploraj projektoj, realigado de kursoj, seminarioj kaj eĉ kulminaj sesioj de AIS kun laŭregulaj finekzamenoj de studentoj de AIS. La kunlaboro koncernos precipe informadikon, interlingvistikon, kibernetikan pedagogion, lingvokibernetikon kaj pedagogion de lingvoinstruado. La pedagogia fakultato de KU Praha informos la studentojn pri AIS San Marino kaj invitados sciencajn kaj pedagogiajn reprezentantojn de AIS prelegi en Prago.

La kontrakton subskribis la prezidanto de AIS San Marino Prof. Dr. Helmar Frank kaj vicdirektoro de KU Praha Doc. Dr. Karel Malý (anstataŭante la rektoron Prof. Dr. Radim Palouš) kun la dekanato de la pedagogia fakultato Prof. Dr. Jiří Kotásek. La subskriban konvenon partoprenis de KU Praha ankaŭ Dr. Jiří Winkler, Dr. Luděk Kouba, Ing. Irena Fialová, Doc. Dr. Zdeněk Křečan, Dr. Vladimír Kambošek, Ing. Zdenka Halašková, Mgr. Ladislava Müllerová, kaj Renata Petrklíčová, kiel perantoj AProf. Dr. Jitka Brockmeyer, OProf. Dr. Miloš Lánský kaj flanke de AIS dr. sc. cyb. Mag. Heinrich Brockmeyer, AProf. Dr. Vlastimil Novobilský, kiel fondaestro de AIS Ĉeĥio, kaj Dr. Miloslav Skalický, kiel ĝia scienca sekretario. Al la komitato de AIS Ĉeĥio apartenas ankaŭ ADoc. Dr. Věra Barandovská, OProf. Dr. Miloš Lánský, AProf. Dr. Jitka Brockmeyer kaj Dr. Petro Chrdle.

La komitato helpas prepari la 4-an Pragan Konferencon pri Kibernetika Pedagogio (1991-08-26/29), kiun okazigas la pedagogia fakultato kun la Tehnika Universitato Praha.

La fonda kunveno de la Ĉeĥa AIS-filio okazos la 29-an de aŭgusto en la aŭditorio de la katedro de didaktika teknologio. Ĝiuj ĈEA-anoj, kiuj havas altlernejan edukigon, ricevis inviton.

.....

La Akademio Internacia de la Sciencoj estis fondita en la jaro 1985 en San Marino, kie ĝi havas sian laŭjuran sidejon, sed ĝia sekretario troviĝas en la germana Paderborn. La oficialaj lingvoj estas la Internacia, la itala, angla, franca kaj germana. Ĝi laboras en sekcioj kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, natursciencoj, moriosciencoj kaj filozofio. Altlernejan povas aliĝi al Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS, el kiu la Senato de AIS elektas kaj nomumas novajn akademianojn, asociitajn membrojn kaj adjunktojn. AIS okazigas konferencojn, eldonas publikaĵojn kaj realigas universitatajn kursojn kun ekzamenoj.

(mm)

»»» PRI ESPERANTO EN GAZETOJ «««

Rapidkurso en ČESKÝ EXPRES:

Ankoraŭ neniam okazis, ke redakcio de ĵurnalo proprainiciate venu kun propono publikigi ĉiutagan kurson de Esperanto. Tamen estis la redakcio de Český expres en Prago, kiu mem sendis sian redaktoron en ĈEA-n por pritrakti pretigon de la kurso, kun la kondiĉo liveri 10 lecionojn antaŭ paso de du semajnoj. Necesis rapide agi, do fine la ĈEA-prezidanto Petr Chrdle mem, kun s-ino Stanislava Vrbová, komencis verki poparte la lecionaron. - La ĉiutaga rapidkurso de Esperanto, trimonata, estis lanĉita la 11-an de januaro per "nula leciono" (antaŭinformo) kaj poste aperadis ĉiutage. La lasta leciono, 60-a, aperis la 8-an de aprilo. La kurson antaŭiris intervjuo, la 7-an de jan., kun "RNDr. Ing. Petr Chrdle, CSc, prezidanto de ĈEA kaj komitatano de Universala Esperanto-Asocio".

Radio Polonia reagis, pere de Jaroslav Mařík, per propono perikorespondadon de la Expres-kursanoj kun polaj gazet-kursanoj. Český-expres aperigis tiun proponon.

La iniciato de Český expres pri la kurso estas salutinda.

(JMK)

Rimarko de la redakcio de Starto:

Kelkajn el la polaj adresoj ni publikigis. Bedaŭrinde niaj esperantistoj kutime deziras korespondi kun okcidentlandanoj. Rezulto: unu esperantisto el kapitalisma lando ricevas kelkcent respondojn el eksocialismaj landoj, kiujn li ne kapablas reciproki, dume kelkcent korespondemuloj el Pollando, Bulgario, Sovetio kaj aliaj orienteŭropaj landoj vane atendas almenaŭ unu leteron.

Ne forgesu, ke lerni la lingvon ni povas kun orientlandanoj same bone!

Infankurso en DUHOVÁ PLANETA:

Kun simila iniciato venis porinfana gazeto Duhová planeta (Iriza planedo), por kiu verkis Miroslav Malovec 15 lecionetojn. Bedaŭrinde aperis nur la unua numero de la gazeto kaj la dua numero estas prokrastigita pro vendoproblemoj. La gazeto estas tute nova kaj nekonata, tamen interesa - kun koloraj bildoj (ekzemple sur la titolpaĝo la granda Inkao sur portiloj, ĉar interne troviĝas granda konkurso pri la Inkaa regno). Tamen en kelkaj gazetvendejoj ankoraŭ aĉetebla kontraŭ 6,80 Kčs.

Post Železničář en 1990 kaj Český expres en 1991 jam la tria redakcio interesiĝanta pri aperigado de E-kurso.

(mm)

DAR el Ostrava:

Dar estas nomo de ĉeĥlingva ĵurnalo, kiun en Ostrava eldonas privatulo Jiří Beránek. En la ĵurnalo aperas ankaŭ informoj pri la vivo de esperantistoj. La esperanta rubriko vivos ĝis tiam, ĝis kiam esperantistoj sendados siajn kontribuojn (ĉeĥlingve). Kompreneble, la informoj devas esti interesaj ankaŭ por neesperantistoj (do ne propagandaj artikoloj pri Esperanto). Ekzemple en artikoloj pri ĉak-olimpikoj de nevidantaj esperantistoj kaj pri turisma semajno en Slovakio estis interesaj ne la arango mem, sed informoj de eksterlandaj esperantistoj pri iliaj landoj: en Mosko estas malplenaj vendejoj, en Irlando la fanatikaj katolikoj kaj protestantoj ne volas serĉi la vojon al kunpaciĝo, en Italio oni intencas limigi la rapidecon sur la aŭtostradoj, en Francio ricevas kluboj senpage ĉambrojn en kulturdomoj, en Anglio estiĝis multaj senhejmluloj, litovanoj batalas por la memstarigo ktp. Se vi scias ion interesan, skribu al adreso: Jiří Beránek, Mariánské nám. 5, 709 00 Ostrava.

(mm)



NI KONDOLENCAS

En junio 1991 forlasis nin s-ano MUDr. Vlastimil Nekuda, kuracisto el la sudmoravia urbo Brankovice. Li estis longjara esperantisto, iama aktivulo de Ceha Esperanto-Junularo en la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj. Laborante kiel kuracisto en Bučovice, li diligente instruadis Esperanton kaj prezidis la tiean Esperanto-klubon. Post transloĝiĝo en la vilaĝon Brankovice li jam pro malsano nur kun granda intereso legis ĵurnalojn kaj librojn kaj tiel li ĝis sia neatendita morto estis esperantisto. En sia profesio li faris multon da bona en la regiono de sia laborejo. La sorto ne donis al li pli multe ol sesdek jarojn. Sed pro lia laborplena vivo lin forgesos nek esperantistaro, nek pacientoj.

(vš)

La 10-an de aŭgusto 1991 forpasis s-ano František Sedláček el Třebíč, iama direktoro de Osvětová beseda kaj unu el la fondintoj de la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, kie li instruadis dum la tuta kvardekjara ekzisto de la tendaro ĝis la lastaj tagoj de sia vivo (ankoraŭ en la unua etapo 1991). Kompreneble li laboris ankaŭ en la Esperanto-klubo de Třebíč kiel unu el la plej aktivaj membroj. En lia persono la movado perdas fervoran aktivulon kaj disvastiganton de la Internacia Lingvo.

(mm)

Jan Neruda:

Kosmaj kantoj

Kosma kanto 21

Kiel leonoj ni en kaĝ'
kaptitaj kradojn skuas,
al la ĉielo flugus ni,
sed Tero nin algluas.

Aŭdiĝas ŝajne stela voĉ':
Proksimen venu, fratoj,
vi, suverenoj, venu nur,
vi, de ter-grund' tenatoj!"

Ni venos! Kreskas nia mens'
kaj nia kor' sopiras
tiom pri mondoj, preskaŭ ĝi
pro la sopir' sin ŝiras'

Ni venos jam, ni venos jam,
ni mondojn ĝisatendos,
kaj ni, leonoj de anim'
la kradon fine fendos!

Kosma kanto 22

Rigardis ranoj en marĉet'
al la ĉiel' vespera,
kaj al ilia stulta mens'
virran' prelegis klera.

Rakontis li pri l'firmament,
montris la lum-iomojn
kaj "talpoj de la univers'"
li nomis astronomojn.

Servas por ties stelespor'
strangege ĉi komputo:
ke dudek milionoj da
mejloj - jen unu futo.

Do por ekzemplo diru ni
- se ni la talpojn kredas -
tri kvaronfutoj al Venus',
Neptun' ĝis tridek cedas.

Sekvanta rakontad' pri Sun'
mutigis la babilojn -
el Suno raspi povus li
da Teroj tricent milojn.

Bonege Suno servas nin,
per kojnoj de radioj,
eternon fendas ĝi je jar'
kaj datoj de kambioj.

Kometoj - grava jen problem':
Ĝin juĝi li ne volas,
sed ne decidu kun facil'
se vi pri ĝi parolas.

Ne ĉiuj estas sen feliĉ',
ne ĉiuj pereigas,
pri unu Lubienicki mem
al atentem' instigas:

kiam radioj ĝiaj nin
penetris al la tero,
ŝuistoj en gastej' de Glin
sin batis kun kolero.

Multegaj steloj - kredu lin -
en la ĉiel' situas,
ĉiu el ili estas sun',
ĝi ruĝas, verdas, bluas.

Se vidas ni en spektroskopo'
de lum' ilia erojn,
tiujn metalojn trovas ni,
kiuj kunplektis Teron.

Li finis. Flustras voĉoj nur
en la auditorio.
Ĉu ili volas, diras li,
ekscii plu pri io?

"Ekscii sole volus ni,"
okulas la kompanoj,
"ĉu estas tie ankaŭ viv',
ĉu estas tie ranoj?"



Kosma kanto 26

Levu la kapon jam, popolo
rigardu al ĉielo!
vi vidos, ke ĉirkaŭ eta stel
cirkulas granda stelo.
Jen kaŭzo: ĉiu eta stel
estas el dura maso,
sed obeema kaj granda korp
estas ĉifona gaso.

Esperas mi, ke tiu pens
la koron kuraĝigas -
ni estu do tia ĉi stelet
kiu la grandajn ligas.
Eblas ĝi, eblas! Ĉiu nur
se estos el ŝtonbloko,
zorgante pri sia propra kern
nacio estos roko!

Tradukis: Jaroslav Mráz

VYSOCKIJ EN ESPERANTO

En 1989 en Sverdlovsk aperis en Esperanto 43-paĝa poemaro "La birdo Gamajun" de la rusa poeto kaj kantisto Vladimir Vysockij (1938 - 1980), kiu dum sia vivo en la tempo de stagnado estis prisilentata flanko de la oficialaj lokoj (sole unu publikita poemo 'uŝita de cenzuristo'), sed amata de la popolo, en kiu liaj 800 poemoj cirkulis en kopioj kaj sonbendoj. Nur en la epoko de "perestrojko", kvin jarojn post lia morto, liaj vizaĝo kaj voĉo aperis en la televido kaj penetris ankaŭ eksterlandon. La poemaron "La birdo Gamajun" tradukis Nikolai Lozgagev, kiu komencis tiun laboron jam dum la vivo de Vysockij klopodante venki malfacilaĵojn de popola, neliteratura lingvaĵo, kiun Vysockij uzis. La poemaro estas grava atesto pri la epoko de stagnado.

NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

redaktita de William Auld kaj eldonita ĉe UEA ĵus aperis: 521 paĝoj, prezo 57 guldenoj (prokeimume 860 Kčs), ekde 3 ekzempleroj triona rabato. Fundamenta krestomatia de Zamenhof aperis en 1903 kaj atingis 17 reeldonojn donante al la esperantistoj modelon de bona stilo. Sed ekde tiu tempo Esperanto grave evoluis kaj tiun evoluon respegulas la nova krestomatia prezentante tekstojn lingve modelajn, aktuale interesajn kaj donante modestan superrigardon de la reala kulturo de la internacia lingvo. Ĝi ne estas seka lernilo kun ekzercoj kaj klarigoj, sed riĉenhava legolibro de originalaj kaj tradukitaj rakontoj kaj poemoj, prilingvaj artikoloj kaj doktaj fakaj eseoj.

Intervjuon kun Jiří Šamla pri la Esperanto-elsendoj de la radiostacio Brno antaŭ milito enprogramigis la elsendo DOMINO la 28-an de majo 1991.

Fragmento el la romano de Ludmila Freiová:
Fremduloj sur la planedo Kvara,
 eldonejo Albatros, 1986, pago 37:

Du fremdaj kosmonaŭtoj renkontas dek- aŭ dekdujaran knabon kaj parolas kun li germane:

"Kiu vi estas?" li demandis per iom alta, tamen firma voĉo.
 "Homoj, al kiuj plaĉas montoj," ekridetis Gabr, sed la knabo nubmienis.

"Ĉi tien neniu rajtas eniri," li diris severe.

"Ankaŭ vi estas ĉi tie," oponis Arc.

"Mi apartenas al la stacio. Sed fremduloj ne rajtas ĉi tie restadi."

"Kial vi pensas, ke ni estas fremduloj?" Ambaŭ persiste ridetis, sed la knabo ne ĉesis nubmieni.

"Ĉar vi ne scias, ke estas malpermesite eniri ĉi tien. Ĉar vi havas strangan parol-akcenton. Ĉar vi rigardis per binoklo."

"Ĉu ankaŭ tio estas malpermesita?" ili ekridis ambaŭ samtempe.

Li ne lasis sin mistifiki. "Vi penegas senrezulte. Per la germana vi stultigos neniun." Konstante li staris en tiu speciala pozo, kiu ebligas tuj forkuri.

"Ni ne volas iun stultigi." Gabr rigardis en la atentostreĉitajn okulojn de la knabo kaj kreskis en li certeco, ke li konas tiujn okulojn. Ankaŭ la lipojn. Lia voĉo ekstremitis.

"Ni volas interkompreniĝi."

"Esperanto sufiĉas," aŭdiĝis la knabo iom mirigite kaj sur lia vizaĝo eknestis meditemo. Samtempe forlasis ĝin la lasta ombro de timo.

"Do tiel. Vi diras: Esperanto." Arc sentis emon ekstari, sed li ĉanĝis la intencon. "Ĉu ĉi tie oni parolas per du lingvoj?"

La okuloj de la knabo ekfajre- ris. Lia pozo malstreĉiĝis.

"Ĉie oni parolas per du lingvoj. Ĉie sur la Kvara. Almenaŭ ... inter la kleraj homoj. Esperanto estas internacia lingvo."

Li alpaŝis pli proksimen. Li ne plu pensis pri la danĝero eĉ minimume, exploremo lin tiris. Kiel eblas, ke ĉi tiuj strangaj fremduloj ne konas tiel memkompre- renajn aferojn? Tuta uragano de ideoj kaj supozoj trakuris lian menson. Ho, kiam mi rakontos tion al Desper! Kaj al Bazilea!



Ludmila Freiová kaj Esperanto

Ludmila Freiova estas ĉeĥa verkistino de scienc-fikciaj romanoj por junularo pri la planedo Kvara, sur kiu Esperanto servas kiel dua lingvo por ĉiu loĝanto apud la gepatra. Jam aperis la verkoj **Timo- sento sur la planedo Kvara kaj Fremduloj sur la planedo Kvara**, en manuskripto atendas sian eldonon la tria romano **Kosma linio Tero - Kvara**.

La aŭtorinon intervjuis juna esperantisto el Mladá Boleslav, Roman Heřman, kaj li prezentas al la legantoj sian interparolon:

Kiel vi taksas scienc-fikcian literaturon?

La scienc-fikcio per siaj kulmi- noj certe ne plu estas neglek- tebla kontribuo por la arta li- teraturo. Kredeble ĝi estas la plej larĝa literatura ĝenro, ki- un konas la nuntempa teorio pri la literaturo. Ĝi ampleksas pro- zon, poezion, kaj dramon - roma- non, rakonton kaj rakonteton. Ĝi povas esti bonhumora aŭ seri- oza, orientita al la estonteco, pasinteco aŭ ankaŭ al la nuntem- po, realigita kiel verko psiko- logia, amrilata aŭ aventurplena, romantika aŭ naturalisma, en formo de leteroj, de taglibro aŭ alimaniere. La scienco-fikcio tuŝas ĉiujn sferojn de la lite- raturo. La epizodoj estas kon- scie fikciaj. Dum la totalisma reĝimo la politikaj kaj ideolo- giaj opinioj ne respondantaj al la marksismo-leninismo estis publikeblaj sole en la scienc- fikcio, same kiel parodioj pri la politika sistemo.

Kiam vi konatiĝis kun Esperanto?

Pri Esperanto mi scias de la in- fanaĝo, kaj post la milito mi konatiĝis kun ĝi dank' al ami- koj-esperantistoj. Kiam oni sci- as la latinan kaj germanan ling- vojn, Esperanto estas kompreneb- la preskaŭ sen vortaro.

Kion vi opinias pri la esperan- tiismo?

Mi agnoskas ĝian valoron kaj la celojn. Ekzistas pli multaj in- ternaciaj lingvoj, sed Esperanto venkas. Mi esperas, ke en la es- tonteco ĝi okupos sian rolon de la internacia komunikilo mal- graŭ ĉia konkurencado de la an- gla. La geesperantistoj troviĝas sur la tuta Tero kaj la kores- pondado kun renkontiĝoj estas bona komenco de la tutmonda in- terkompreniĝo. Kiam aperos du tri politikistoj-esperantistoj, komenciĝos nova etapo. Estas konsilinde aranĝadi konversaci- ajn renkontiĝojn nur por donita temo, en kluboj kaj ankaŭ inter- nacie...

Dankon por la interparolo.



FOR LA VERDAN STACION !

Bernard Golden skribis pri la Verda Stacio jenon:

"Kaj kiun valoron havas nostalgia fanfaronado pri eventoj okazintaj antaŭ jardekoj en Ĉeĥoslovakio? Kiun efikon aŭ influon havas la Verda Stacio en la nuntempo? Absolute neniu! Ĝi estas nura efemerajo, malaperinta por ĉiam, ĉar hodiaŭ tute ne eblas aŭskulti ĝiajn programojn. La grava demando, kiun la broŝuro ne faris, kaj kiun la avangardistoj ne respondos, eĉ se ili scias la respondon, estas, kial ne ekzistas iu verda stacio en Ĉeĥoslovakio hodiaŭ?"

Esperantista Vegetarano (1990, 2/15)

Sinjoro Bernard Golden regurdas sian malamon al la Verda Stacio, vokante pri ĝi "for en la abismon de forgeso!". (Cetere estas mirige, ke slovakia Esperanto-revuo akceptas tian prihistorian misprezenton fare de nespertinto.) Golden tie efektive kraĉas sur la enhavo de rememoro de la fama verkisto František Kožík, pri lia aktiveco por Esperanto en la Ĉeĥoslovaka Radio. En reago al mia defendo (Starto, 1985/5) de la signifo de la Verda Stacio, kreinto de unuaranga esperantlingva dram- kaj operkulturo, B. Golden ofende atakas mian personon en la "Esperatista Vegetarano". Parenteze: kion Golden tiel forkondamnas (V. Stacion), la samon alte taksas Hungara Vivo (1989, 1/23): "Mi ankoraŭ nun alte respektas tiun pioniran agadon de la ĉeĥaj artistoj". Kaj d-ro J. Kavka, kiun Golden apoge mencias, skribis al mi (1988-12-05): "Placis al mi via defendo de la Verda Stacio en Starto".

Duaparte, B. Golden volas imputi al mi defendon al la neologismemo de la t.n. Praga skolo. Sed en nia lando estas konata mia negativa sinteno al la rumlerismo (same d-ro Kavka). Mia disputo tiutema en la Artiliteratura sekcio, buŝa kaj skriba, atestas pri tio. La rumlerismon mi ne defendis, kiel erare opinias Golden.

Mi bedaŭras la sintenojn de B. Golden, kaj ne nur mi. Prof. Gašparec, aŭtoro de didaktikaj verkoj, skribis en letero (aŭgusto 1989), ke Golden, metie kolera arkeologo, malbonintencas "samideano", fendule malhelpas al la Esperanto-movado ... kritikoj pri li aperis en revuoj (ekz. belga, hungaria, GDR-a).

Miaflanke mi opinias Bernardon Golden, mian plurjaran korespondanton, sperta lingvisto, sed persone certagrade kompatinda, ĉar la dumjunaĝa vivo (mi scias detalon) rifuzis al li sperti, kio estas s e n t o, elemento de harmonia kunvivado. Kaj lia aroganta voko "ĉeĥa-ŝmeĥa" (en la kritiko de traduko de Vondroušek, vidu Esperantiston Slovakian, 1988/4) eĉ se kriptograme, ofendas ĉiun ĉeĥon. S-ro B.G. scias, jam pro sia deveno, ke "ŝmeĥe" estas en la juda-germana "honto, hontinde" (!). Kaj tiaj fenomenoj scias boligi la sangon de la pripafataj personoj.

Diskuto? Jes! Disputo? Prefere for la abismon!

Jaroslav Mařík, 1990-10-28

Rimarko de la redakcio al la letero de J. Mařík:

S-ro Golden eraras. La Verda Stacio postlasis kelkajn gravajn verkojn, precipe la majstrajn tradukojn de Tomáš Pumpr (Vendita fianĉino, Najado, En la putoj). Restis ankaŭ rememoroj de la aktoro Karel Höger, kiu havas en la ĉeĥa kulturo similan pozicion kiel Kalocsay aŭ Baghy en la Esperanta, tial la ĉeĥaj esperantistoj apogas sian priesperantan informadon je lia aŭtoritato, kaj aŭtoritato de tri aliaj gravaj ĉeĥaj artistoj - geaktoroj Leraus, Kurandová, kaj verkisto Kožík, ĉar ilia aktivado en la Esperantlingvaj elsendoj pravas, ke Esperanto ne estas afero ridinda. Fine la sperto, ke iam ekzistis radio-elsendo en Ĉeĥoslovakio, donas esperon, ke foje ĝi reaperos, kiam venos pli favoraj kondiĉoj.

Koncerne s-ron Rumler la redakcio opinias, ke kiam li limigas uzadon de neologismoj kaj poezias per la klasika Esperanto, liaj tradukoj apartenas al plej bonaj.

SPIRITISTOJ, ESPERANTO KAJ PROGRESO

La spiritisma komunumo de la regiono de Sao José do Rio Preto en la brazila ŝtato San-Paulo pere de Bonfara Spiritisma Societo komencis konstrui Helpan Organizaĵon, kiu aktivos en la fakoj de sano, edukado, socia progreso kaj disvastigado de Esperanto. Ĝia Regiona Spiritisma Edukada Instituto helpos precipe al forlasitaj infanoj, al olduloj kaj al loĝantoj de antaŭurboj. La brazilaj spiritistoj dedikas sin al edukado de Esperanto ekde 1906 kaj al ĝia disvastigado ekde 1909. La Societo atendas subtenon kaj simpatian de esperantistoj je adreso: SEB-Sociedade Espírita de Beneficência, Caixa Postal 126, Av. Octávio Luiz De Marchi, 333/15.035 - Sao José do Rio Preto (SP), Brazilo.

En Sovetunio pasintjare aperis verko "Ĉernobil", dokumenta novelo pri la averio de la soveta atomelektrujo, de Jurij Ĉerbak. Traduko: Elena Ŝevĉenko, Aleksej Ĵuravljov. Eld. PROGRESO, 1990, Moskvo, 16x10 cm, 398 p., 5843 ekzempleroj. Aro de fotografiaĵoj. Prezo ne indikita.

TURISMA BROSURO DE DANA URBO



Næstved

La dana urbo Næstved, kiu situas 90 km sude de la ĉefurbo Kopenhago en idilia pejzaĝo, eldonis Esperantlingvan enmetadon al la urba turisma broŝuro. Mendu ĉe Turisma Oficejo, Købmagergade 20 A, DK-4700 Næstved, Danlando.

JMK

(daurigo el la plumo de J. Mařík)

Jaroslav Šustr (6.12.1901, Usti n.O., mortis en Praha 8.9.1979).
 Vendejestro de la ŝtata komerco. Esperantisto de 1917, funkciulo
 de EK Praha 1921, de ĈAE, EAĈSR, 1931-1959 prezidanto de EK
 Praha, sinifera, (kaŝe) mecenatema. 1931 - 1979 delegito kaj
 ĉefdelegito de UEA, landa peranto de Heroldo de Esperanto (1920
 - 1979). Lia amataĵo estis la kluba biblioteko, kiun li daŭre
 kompletadis. Trifoje li savis la bibliotekon antaŭ pereco
 (okupacio, politikaj kaŭzoj) kun 1800 volumoj, kaj enmetinte en
 1969 (refondiĝo de EK) sian propran libraron, li starigis
 bibliotekon kun 4700 volumoj. La kluba estraro atribuis al ĝi
 honoran titolon "Biblioteko Jaroslav Šustr". Laŭ statistiko de M.
 Gjiĵovo, ĝi posedis en 1980 jam 6100 volumojn (85 metroj de
 bretlongo), estante tiam la tria plej granda societa biblioteko
 en la mondo, post Londono kaj Roterdamo (bedaŭrinde post 1980
 daŭre fermita kaj nun atendanta riskan sorton esti forigota, pro
 ekonomia kaŭzo).

Ŝuŝtr senlace havigadis al la Klubo eksterlandan literaturon kaj gazetojn. Post la likvido de la landa asocio (EACSŖ) 1952 li laŭpove plenumadis iujn ĝiajn taskojn por plenigi la organizan vakuum. Pro sia daŭra aktiveco landskala celanta malhelpi pereon de la Movado (la EK dissendadis pli ol mil ekzemplerojn de sia Bulteno, eĉ 1800), en 1958 li estis tenata 92 tagojn en arestejo de la totalisma reĝimo (kun malpermeso eksidi dum tutaj tagoj) kaj poste devis abdiiki la klubgvidadon. Sub lia gvido la Klubo bone prosperis (j. 1946: 500 kotizantaj membroj).

Jaroslav Šustr iariĝis honora prezidanto de la EK kaj honora membro de ĈEA kaj ricevis diplomojn de la eduk-ministerio de Ĝuatemalo (1953) kaj Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (1965). Persono preskaŭ ne konanta libremtempon, dediĉanta sin al formika ĉiutaga laboro por la Movado (la poŝto alportadis leterojn ne individue, sed en sako). Du trajtoj karakterizis lin, laŭ d-ro S. Kamaryt: aktiveco kaj studemo, kiuj kaŭzas ĝojon pro farita laboro. Šustr mem: Ĉion, kion mi faris kaj faras, mi opinias mia devo.

JUDr. Josef Fousek estis advokato en Přelouč. Li naskiĝis 9.8.1891 (do antaŭ 100 jaroj) en Hostim ap. Beroun. Esperantisto de 1907, daŭre aktiva, gvidis jam en 1908 Esperanto-kurson en liceo en Chrudim, ĉeestis plurajn Universalajn Esperanto-Kongresojn. Lian signifon ni vidas en lia alte evoluinta arto de ĝusta tradukado de muzikigitaj tekstoj en Esperanton. Kiel funda konanto de muzik-scienco kaj teorio versofara, de natura melodio de la lingvo kaj principoj de melodio, li estis tre utila kunlaboranto de D-ro Tomáš Pumr en la eminentaj tradukoj de la tri operoj - En la puto (Blodek), Vendita fianĉino (Smetana) kaj Najado (Dvořák), prezentitaj en la Verda Stacio (Brno, Praha) fare de elstaraj oper-kantistoj. Li mem ŝatis traduki kaj kanti en Esperanto. La elstara Esperanto-poeto Stanislav Schulhof estis lia amiko, kiu konsultis lin pri siaj poemoj. La esoon de Fousek "Jak překládati zpěv" (Kiel traduki kantojn) vi povas trovi en ESPERANTISTA, Praha.

8/1948, p.45. "Persistemo estas lia virto plej valora por ni",
skribis pri li d-ro S. Kamaryt. Kaj li persistis ankaŭ en la
vivodaŭro: 92 jarojn! Nunjare ni povas rememori lian 100-an
naskiĝdatrevenon.

Vilibald Scheiber naskita 29.12.1904 en České Budějovice, estis profesoro de la Konservatorio en Brno, direktanto de orkestro de la teatro en Brno, ĉefo de la operejo en Opava. Membro de la Esperantista Klubo en Brno ekde 1945 kun la funkcio de ĉefo de artismaj muzikprogramoj. Okaze de gravaj datrevenoj de la Esperanto-movado kaj aliaj li organizis publikajn artprogramojn, pli ol 60, kiuj altigis la prestiĝon de la esperantistoj ankaŭ en la ekstermovada medio. Li muzikigis poemojn de Krička kaj Baghy. Li mortis en Brno 2.8.1974. (daŭrigota)

XX

Renkontigo sur Ĉantoryja

Sur la supro de la silezi-beskida monto Ĉantoryja, kie iras
 ŝtatlimo inter Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, okazis en la tria junia
 dimanĉo 1991 jam tradicia renkontiĝo de polaj kaj ĉeĥoslovakaj
 esperantistoj, ĉifoje sen ĝenoj flanke de la doganistoj. Eĉis
 interkonsentite, ke niaj esperantistoj aŭtune vizitos
 Esperanto-klubon en Biala, kaj polaj samideanoj akceptis inviton
 al nia Esperanto-kafejo en Ĉeská Třebová. Ni esperas, ke
 venontfoje kunvenos sur Ĉantoryja kelkoble pli multe da
 esperantistoj ekkursantoj.



Sur pinto de Čantoryja (fotografis Radek Wolkowinskij)

EL NIAJ KLUBOJ KAJ RONDETOJ:

Havířov - La 20-an de junio vizitis nian klubon s-ro Chytil el Přerov kaj s-ro Gajdzica el Třinec. Ili rakontis al ni pri sia partopreno ĉe la pasintjara fervojista kongreso en la norvega Hamaar, projekciis belajn diapozitivojn kaj filmojn ne nur pri tiu urbo kaj kongreso, sed ankaŭ pri la svedaj Malmö kaj Stokholmo kaj la norvega cefurbo Oslo. Agrabla vespero por ĉiuj ĉeestantoj. (AST.)

Česká Třebová - Sabate la 22-an de junio 1991 alveturis en la urbon Česká Třebová gesamideanoj por travivi du agrablajn tagojn. Tuj ĉe la stacidomo la renkontiĝo komenciĝis per fotado kaj estis daŭrigita en la parko Javorka per vizito de la Esperanto-arbo. Sed la vera inaŭguro de la renkontiĝo okazis en la kafejo ESPERANTO per solena parolo kaj kantado. Sekvis bonega tagmanĝo, informoj pri kluboj, infanoj prezentis, kion ili ellernis el Esperanto dum la jaro. Grandan intereson vekis tombolo, ĉar inter multaj allogoj gajnotaĵoj figuris ankaŭ grandega torto kun E-stelo. Bedaŭrinde, ne gajnis ĝin la infanoj, sed plenkreskulo, tamen kiel vera esperantisto li disdonis la torton al ĉiuj ĉeestantoj. S-ino Jana Křížková sugestis priskribis sian vojaĝon en Francion kaj pri la kongreso de IFEF en Olomouc informis inĝeniero Ladislav Kovář. Post vespermanĝo amuzis la gesamideanojn konkurso en kaj pri Esperanto. Dimanĉe realigis aŭtobusa ekskurso al la banurbo Velké Losiny (kastelo, Esperanto-arbo en la kastela parko, termala naĝejo). La venonta renkontiĝo efektiviĝos en Lanškroun.

(Zdenka Novotná)

Suprenmarŝo al Praděd - La 29-an de junio esperantistoj (17 plenkreskuloj kaj 3 infanoj) el Jeseníky, Olomouc, Přerov, Šumperk, Polička kaj Štíty kolektiĝis antaŭ kabano Barborka, plantis tie arbojn kaj poste marŝis supren sur la monton Praděd - almenaŭ tiuj, kiuj estis varme vestitaj, ĉar la vetero estis malvarma, venta, pluveta. Post unu jaro la aranĝo ripetiĝos kaj espereble estos preparita ankaŭ loĝado por partoprenantoj venantaj de malproksime.

Písek - Strakonice - En la tagoj de la 28-a ĝis la 30-a de junio 1991 aranĝis la esperantistoj el Písek kaj Strakonice amikan renkontiĝon en Nespiče apud Vacov (en la Bohema arbaro Šumava). Alveturis ankaŭ gesamideanoj el České Budějovice, Plzeň, Praha, Mělník kaj eĉ s-ro R. Wais el Germanio. La geedzoj Tomeček venis kun siaj du filoj, kiujn ili instruas paroli Esperanton. Malgraŭ malfavora vetero la renkontiĝo paŝis en agrabla etoso, kun ludoj por infanoj kaj kursoj por interesitoj. La lingvan rondeton gvidis s-ro Soušek, kantojn instruis s-ino Skřivánková kaj la danko por la organizado apartenas ĉefe al s-ro Štorek.

(Josef Potužník)



Olomouc - En la klubo de finstudintoj de Universitato por la tria aĝo en Olomouc estis kreita interesrondeto pri Esperanto. Ĝian unuan kunvenon 1991-05-16 vizitis ankaŭ kelkaj eksterlandaj partoprenantoj de la IFEF-kongreso okazanta tiam en Olomouc. Kun ili estis priparolita speciale la ebleco ek rilati kontaktojn kun similaj institucioj por homoj de la tria aĝo en la mondo helpe de Esperanto.

La 8-an de junio 1991 vizitis Olomouc grupo de polaj esperantistoj el la urbo Skoczów. Ili partoprenis ankaŭ diservojn en la kapelo de beata Johano Sarkander naskodeveninta el Skoczów. Post sankta meso estis skolegita speciala salutletero de la nova ĉefepiskopo en Prago PhDr. Miloslav Vlk, kiu en la junaĝo kiel studento partoprenis agadon E-movado kaj ĝis nun estas ĝia favoranto.

La 23-an de junio festis sian 80-an naskiĝtagon honora prezidanto de Esperanto-klubo en Olomouc s-ano Vlastimil Blažek, kiu dum sia tuta vivo dediĉas sin al oferema laboro por la Esperanto-movado. Al lia grava vivjubileo ni tutkore gratulas.

(Dr. Vladimír Mohapl)

La 4-an kulturalan festivalon dediĉitan jam tradicie al Jiří Kořínek kaj Tomáš Pempř okazigas de la 4-an ĝis la 6-an de oktobro la E-klubo en Ústí n.L. kaj en Teplice. La aliĝkoltizo estas 25 Kčs por enlandanoj kaj 20 Kčs por eksterlandanoj. La tranoktado laŭ via menso en interhoteloj aŭ sportaj tranoktejoj (garantia kaŭcio 75 Kčs). Panta kultura programo; prelegoj de prof. s-ro Vlastimil Novobilský kaj Jaroslav Mařík; ekskursoj. Skribu al: Ing. Josef Kříž, Družstevní 11, 400 07 Ústí nad Labem.

KET en Sebranice

En bela arbara valo en Sebranice apud Litomyšl partoprenis 60 personoj (3 ĝis 75-jaraj) katolikan Esperanto-tendaron estratan de Miloš Šváček (20.7. - 3.8.1991). Inter la tendaranoj estis ankaŭ samideanoj el Slovakio kaj komence eĉ franca familio, kies filinoj korespondas kun infanoj el Česká Třebová. Kelkaj el tiuj malgrandaj gesamideanoj alveturis por rekonigi kun siaj francaj korespondatinoj kaj bone interbabilis ĉiuj, kvankam la francaj gepatroj bezonis interpretistan helpon.

Dimanĉe la 28-an de julio vizitis la tendaron episkopo Karel Otčenášek, kiu konas Esperanton, kaj fine de la restado nederlandaj gastoj, kiuj respondis kelkajn demandojn pri sia lando kaj invitis junajn gesamideanojn viziti Nederlandon. Krom ĝistagmeza lernado de Esperanto povis la tendaranoj ĉiutage ĉeesti meson servantan de P. Savio Pavel Říčka, spirita gvidanto de la tendaro. Rapidkurson de gitarludo por interesitoj gvidis Hana Baťová. Post instruado la tendaranoj banis sin, sportis, diskutis, kantis, pentris, faris tendarfajrojn aŭ babilis kun najbaroj el Sebranice, kiuj ofte vizitadis la tendaron.

(Zdenka Novotná)

LODZA INFORMILO estas 8-paĝa bulteno (formato A4) de la lodzaj esperantistoj, kiuj sendas ĝin al vi kontraŭ poŝtmarkoj kaj libroj. Ankaŭ vi povas kontribui en ĝi per viaj informoj. La Lodza informilo aperas sesfoje en jaro. Skribu al:

PZE Oddział w Łodzi,
ul. Moniuszki 5, 90-950 Łódź,
skr. poczt. 337; tel. 32 65 03.

LINGVO-ORIENTIGA INSTRUADO

La tielnomata "lingvo-orientiga instruado" (LOI) celas per taŭga preparado de la lernanto plifaciligi la lernadon de fremdaj lingvoj.

Oni povus starigi konkurencajn lern-grupojn. Unu grupo tuj komencas lerni la anglan lingvon, la alia, dum la sama tempo, ankoraŭ ne lernas la anglan, sed ricevas certan lingvo-orientigan instruadon (80 - 160 studhoroj), kaj nur poste komencas lerni la anglan. Tiam ĉi tiu prepar-instruado efikas tiel, ke la posta lernado de la angla estas pli facila. Tio signifas, ke post certa tempo la grupo ĝuinta LOI preterkuras la konkurencajn grupon.

La ideo malŝpari iom da tempo por prepari la lernanton al nova instruado, ebligante la postan ŝparon de multe pli da tempo, jam dum jardekoj estas uzata en la didaktiko de natursciencoj. Tie oni normale ne tuj instruas la instru-aĵojn mem, sed oni komencas per pedagogie taŭga modelo de la instruado. Tia modelo devas esti:

- simpla, por ke ĝi ne atentigu pri kroma informo, kiu ne estas esenca por la instruinda strukturo (ekz. en biologio senodora, ĉar artefarita homa korpo)
- regula, por ke ĝi ne atentigu pri iuj "esceptoj" (ekz. ideala skeleto havanta kompletan dentaron sen la hazardaj mankoj de realaj skeletoj)
- disigebla, tiel ke oni povu dise instrui la lernelementojn, eĉ se ili estas en la lernobjekto mem interplektitaj (la kutimaj lernejaĵoj de la homa korpo ebligas unuope rigardi de ĉiuj flankoj la disigeblajn organojn).

La Internacia Lingvo (ILO) estas tia pedagogie taŭga modelo de fremdaj lingvoj. ILO estas:

- simpla (ekz. ĝi havas ja pronomojn, sed ne konjugaciajn finaĵojn)
- regula, ne havanta esceptojn (ekz. la pluralon ĉiam indikas la finaĵo "-j", eĉ en la kazo de escepto en la angla: mouse/mice = muso/musoj)
- disigebla, ĉar ĝi estas aglutina lingvo.

Tial ILO povas taŭgi kiel modelo de etnaj fremdlingvoj instruendaj. Tio signifas, ke tiu modelo estas tre facile lernebla kaj malfermas la lernkapablon de la lernanto por fremdaj lingvoj, ĉar en lia cerbo ekstaras sen ajna kamuflo la diversaj dimensioj, laŭ kiuj oni devas diferencigi la diversajn lingvojn ekzemple kompare al la gepatra lingvo. Kiun oni jam antaŭe konis, sed ne trapensis.

Ĉu tio estas empirie pruvita?

La hungara interlingvisto Szerdahelyi havis je dispono (1970) klason de hungarlingvaj lernantoj, kiuj unue estis lernintaj la Internacian Lingvon. Poste ĉi tiu malgranda grupo dispartigis por lerni aŭ la rusan, aŭ la germanan, aŭ la anglan, aŭ la francan. La grupo, kiu nun lernis la rusan, havis 25%-an plifaciligon pro la antaŭa ILO-lernado. La redukto de la malfacilo de la germana lingvo estis 30%, tiu de la angla 40%, kaj tiu de la franca eĉ 50%.

En Germanio plurajn jarojn poste LOI estis realigita kun multe pli da lernantoj, sed ekspluatita nur por eltrovi la lernplifaciligon de la angla lingvo. La plejmulto de la instruistoj je dispono estis multe malpli bone preparita por ĉi tiu instruado ol iliaj gekolegoj en Hungario. Tamen montriĝis, ke post du jaroj da LOI la lernplifaciligado de la angla lingvo ja ne estis 40%, sed tamen ĉirkaŭ 20%. Estis interese, ke ĉi tio validis ne nur por la angla lingvo, sed ankaŭ por la gepatra, kiun la lernantoj dum LOI ja iom trapensis kontraste al ILO.

Malpli facile komprenebla estis la rezulto en la fako matematiko: la kialo estas trovebla en tio, ke la studo de senescepta lingvo kuraĝigis la infanojn memstare serĉi leĝojn ankaŭ en la kalkuloj.

Jen estas ŝanco, kiel utiligi ILO-n en la lerneja instruado - ne kiel celon, sed kiel rimedon.

(Laŭ Helmar Frank "Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo")



KORESPONDI DEZIRAS

El Sovetio:

*** **Ŝestakova Lena**, 644092 Omsk, Lukaŝeviĉa 15 "V" - 14; 28-jara edukistino, si deziras korespondi pri turismo, kaj muziko, interŝanĝi suvenirojn *** **Serova Olga**, 442600 Bednodemjanovsk, Penzenskaja obl., ul. Proletarskaja 183; 14-jara lernantino, ŝi lernas Esperanton kaj la germanan, kolektas poŝtmarkojn, kalendaretojn kaj bildokartojn, ŝatas legi ***

El Brazilo:

*** **Sonia Mesquita**, Av. Copacabana 360, ap. 1003, CEP 22020 Rio de Janeiro; pri pluraj aferoj.***

El Pollando:

*** **Henryk Lawrynowicz**, os XXX lecia 8/16, 11-500 Gizycko; 22-jara komencanto, li interesiĝas pri turismo, ŝakludo, motorcikloj, fotografiado kaj pri psikotroniko *** **Barbara Basiak**, 26-214 Zaboronice; 27-jara edziniĝinta ekonomistino, ŝi deziras korespondi pri literaturo kaj muziko *** **Jan Kozuch**, ul. Nowowiejska 22/96, 25-532 Kielce; 47-jara, li havas hobiajn Esperanto kaj turismo, li deziras korespondi kun geamikoj el Praha *** **Ladislav Dmowski**, 05-825 Grodzisk Maz., ul. Cicha 4m/3; 56-jara komencanto, li ŝatas korespondi pri pentrado, kantado, pri muziko kaj naturo ***

El Ĉeĥoslovakio:

*** finintoj de la kurso por komencantoj en Prago: **Ivana Brabcová**, **Jiří Bubeníček**, **Jaroslava Hradcová**, **Ivana Pechová**, **Eliška Rychlíková**, **Andrea Sequensová**, **Michal Schwarzbach** - skribu al kursetro: Ing. Ludvík Veselý, Litvinovska 527/22, CS- 190 00 Praha 9



Český esperantský svaz, Jilská 10,
110 01 PRAHA 1, tel.: 02/220262,

+ S T A R T O +

presorgano de Ĉeĥa Esperanto asocio, Jilská 10,
Čeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Respondeca
redaktoro: Miroslav MALOVEC, administranto:
Ing. Karel DANĚK, STARTO, poŝtfako 425, CS-660 25
BRNO 2, Čeĥoslovakio. Abonebla ĉe niaj perantoj,
ĉe UEA aŭ rekte ĉe nia asocio.

Nepravdivelný věstník Českého esperantského svazu,
Vychází 6 x ročně. Obdrží členové svazu.

Odpovědný redaktor: Miroslav MALOVEC,
administrátor: Ing.Karel DANĚK, STARTO, pošt.p.
425, 660 25 BRNO 2.

NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Hodonín 1

Podávání novinových zásilek povoleno
Jihomoravským ředitelstvím spoju v
Brně, č.j.: P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991.